Kiamaniere mi venas en la ĉielon? [1] *(Esperanto)*

La demando pri la eterneco estas de la homoj subpremita. Tion oni povas observi eĉ ĉe tiuj, kiuj tamen meditas pri sia vivofino. La usona aktorino *Drew Barrymoore* ludis kiel infanfilmostelulo en la fantazia filmo „E.T. – la Eksterterano" unu el ĉefroloj. Kiam ŝi iĝis 28-jara, (nask. 1975), ŝi esprimis sian deziron: „Se mi devus morti antaŭ mia kato, oni donu al ĝi manĝi mian funebrocindron. Tiel mi almenaŭ povus supervivi en mia kato." Ĉu tiu ĉi senpripenseco kaj miopeco rilate la morton ne estas io teruriga?

Dum Jesuo vivis sur la tero, multaj homoj venis al li. Iliaj problemoj preskaŭ ĉiam havis mondecan karakteron:

- **Dek eligitaj lepruloj volis resaniĝi** (Luko 17,13),
- **Blinduloj volis reakiri vidpovon** (Mateo 9,27),
- **Iu serĉis helpon ĉe heredkverelo** (Luko 12,13-14),
- **Fariseoj venis per la kaptila demando, ĉu oni pagu al la imperiestro imposton** (Mateo 22,17).

Nur malmultaj homoj venis al Jesuo por ekscii, kiamaniere oni venas en la ĉielon. Iu riĉa junulo alparolis lin per la demando: ***„Bona Majstro, kion mi faru, por heredi eternan vivon?"*** (Luko 18,18). Estis dirite al li, kion li faru, nome: forvendi ĉion, je kio alkroĉiĝas lia koro kaj postsekvi Jesuon. Sed ĉar li estis tre riĉa, li ne obeis la konsilon kaj tiel rifuzis pri la ĉielo. Troviĝis ankaŭ homoj, kiuj la ĉielon tute ne serĉis, sed dum la renkontiĝo kun Jesuo ili estis pri ĝi atentigitaj. Kaj poste ili en momento kaptis la okazon. Zakĥeo ekdeziregis vidi Jesuon. Sed li trovis pli ol li atendis. Post la vizito en la domo de Zakĥeo – kvazaŭ dum kaftrinkado – li trovis la ĉielon. Jesuo konstatis: ***„Hodiaŭ venis savo al ĉi tiu domo"*** (Luko 19,9).

Kiamaniere ni povas trovi la ĉielon?

Post la ĝis nun diritaj vortoj ni povas precizigi:

- La ĉielon oni trovas en tute preciza tago. Estas bone tion scii, ja tiamaniere ankaŭ por vi, kara leganto, estas hidiaŭ eble akiri ĉe Dio vian eternan vivon.
- La akiro de la ĉiela regno ne estas ligita al iu farenda propra kontribuo.
- La ĉielan regnon oni povas trovi tute nepreparita.

Niaj propraj konceptoj, kiamaniere veni en la ĉielon, estas tute falsaj, se ni ne eliras de la eldiroj de Dio. Iu furorkantistino kantis pri klaŭno, kiu post multjara laboro en la cirko retiriĝis: „Li venas certe en ĉielon, ja la homojn faris li feliĉaj." Iu riĉa donatora damo igis konstrui domon por malriĉuloj, en kiu 20 virinoj povis vivi senkoste. Sed ŝi kondiĉigis tion per unu kondiĉo. La virinoj devis akcepti devon, ĉiutage dum unu horo preĝi por la animsavo de la donatora damo.

Sed kiu nin vere venigas en la ĉielon?

Por klare kaj kompreneble respondi tiun ĉi demandon, Jesuo rakontis al ni parabolon. En la evangelio laŭ Luko, ĉapitro 14,16 li parolas pri homo [tiu en la parabolo reprezentas Dion], kiu aranĝas grandan feston [ĝi en la parabolo reprezentas la ĉielon] kaj unue dissendas siajn invitilojn nur al certaj adresoj. Sed ĉiuj respondoj estas deprimaj.

[1] Übersetzung des Traktates „Wie komme ich in den Himmel? in Esperanto (Stand: 15.08.2007).